Projekto por Greziljono

La bilancoj donas la laŭeble plej fidindan bildon de la kooperativo. La bilancoj de la 15 lastaj jaroj vidigas mankan takson de la konstruaĵoj kaj nesufiĉajn amortizojn kaj proviziojn. Ili estimeblas je pli ol 500.000 eŭroj kaj vidigas kaŝitan deficiton de 10.000 eŭroj jare (eŭro konstanta) depost la kreo de la kooperativo.

La revizio de la posedaĵo por atingi ĝian plenan gastigo-kapaciton necesigas investon identan al tiu manko de provizio.

Laŭ la bilancoj, neniu banko akceptos prunton por financi tiujn laborojn.

La sola solvo estas aldono de kapitalo per donacantoj kiuj profitas fiskan dedukton de 66%, kompletigita per aldonoj de esperantistaj investantoj.

La ekonomia vivopovo longdaŭra necesigas 3.500 tranoktojn kadrigitajn de volontuloj ; egalvaloro de plentempa salajrato necesigas ĉirkaŭ 1.750 aldonajn tranoktojn jare.

Greziljono estas tro grand-dimensia por nura esperantista agado.

Se ni konservas Greziljonon, la esperantista agado estos malplimulta, la esperantistaj societanoj riskas iĝi malplimulto en la Ĝeneralaj Membrokunvenoj. La kreado de SCI (societo civila de nemoveblaĵoj) konsiderendas por konservi plimulton je la administrado de la kastelo.

Por atingi la fidon de la donacantoj kaj investantoj, ni devas prezenti al ili projekton de gvidado-regado. Mi redaktis en oktobro 2009 projekton kiun mi prezentis al la komisiono SRP (statutoj, reguloj, projektoj) kaj al la Komitato. Ĝi priskribas taskaron enhavantan: Komitaton kiu decidas, Direktoraron kiu aplikas la decidojn de la Komitato, specialigitajn kolegiojn (administrado, komunikado, donacantoj kaj investantoj, organizado de staĝoj...) konsistantajn el kompetentuloj. Ili agas sub la aŭtoritato de Direktoro, kiun nomumas la Ĝenerala Asembleo.

La Direktoraro povas nomumi Prezidanton kiu reprezentas la Kooperativon.

Aranĝoj farendaj

La administrantoj devos al la esperantista komunumo proponi solvojn ekonomie vivopovajn.

En la lasta trimonato de 2010, Eksterordinara Membrokunveno validigos planon de protekto, kun takso de la valoro de Greziljono por la ebla kreo de SCI aŭ, se la societanoj tion decidas, la vendon de Greziljono.

Tiu ĉi dokumento estas sintezo de 2 franclingvaj dokumentoj elŝuteblaj el la interretejo de Greziljono je la sekva adreso:

http://gresillon.org/spip.php?article33

Jean Marie Houviez

Projet pour Grésillon

Les bilans donnent une image la plus fidèle possible de la coopérative. Les bilans des 15 dernières années font apparaître une absence de l'évaluation du bâti avec insuffisance des amortissements et provisions. Ils peuvent être estimés à plus de 500 000 euros et font apparaître un déficit caché de 10 000 euros par an (euro constant) depuis la création de la coopérative.

La remise en état de la propriété pour obtenir sa pleine capacité d'hébergement nécessite un investissement identique à cette absence de provision.

Au vu des bilans aucune banque n' acceptera un prêt pour financer les travaux.

La seule solution est l'apport en capitaux par des donateurs qui bénéficieraient d'une déduction fiscale de 66%, ceci complété par des apports d'investisseurs espérantistes.

La viabilité économique à long terme nécessite 3500 nuitées encadrées par des bénévoles ; un équivalent temps plein salarié nécessite environ 1750 nuitées supplémentaires par an.

Grésillon est surdimensionné pour une activité exclusivement espérantiste.

Si nous gardons Grésillon, l'activité espérantiste sera minoritaire, les sociétaires espérantistes risquent d'être en minorité dans les A.G. La création d'une société civile immobilière est à envisager pour garder une majorité dans la gestion du château.

Pour obtenir la confiance des donateurs et investisseurs, nous devons leur présenter un projet de gouvernance. J'ai rédigé en octobre 2009 un projet que j"ai présenté à la commission SRP et au C.A. Il décrit un cahier des charges comportant: un C.A qui décide, un directoire qui applique les décisions du C.A, des collèges spécialisés (gestion, communication, donateurs et investisseurs, organisation des stages...) composés de personnes compétentes. Ils sont tous sous l'autorité du gérant, lui même nommé par l'A.G.

Le Directoire peut désigner un Président qui représente la Coopérative.

Mesures à prendre

Les administrateurs devront proposer à la communauté espérantiste des solutions économiquement viables.

Dans le dernier trimestre 2010, une A.G Extraordinaire validera un plan de sauvegarde, avec une estimation de la valeur de Grésillon pour la constitution éventuelle d'une S.C.I. ou si les sociétaires le décident, la vente de Grésillon.

Les documents ont été rédigés en français par moi-même et traduits en espéranto par par la commission électorale, je ne maitrise pas en espéranto le vocabulaire des expressions techniques sur la gestion et la réglementation française, ni leurs expressions internationales équivalentes.

Ce document est une synthèse de 2 documents téléchargeables sur le site Internet de Grésillon aux adresses suivantes:

http://gresillon.org/IMG/pdf/JeanMarieHouviez_ProjetPourGresillon.pdf
http://gresillon.org/IMG/pdf/JeanMarieHouviez_ProjetDeGouvernance.pdf
http://gresillon.org/spip.php?article33

Jean Marie Houviez